

Kubo diversigas siajn energifontojn



La uzado de puraj energioj estas unu el la vojoj por tiel nomataj evolulandoj progresi sen damaĝi la medion, temo tre aktuala en la nuna epoko kiam la media krizo provokas gravajn sekvojn en la sano de nia planedo.

Kubo, kiu travivas ekonomian sieĝon flanke de sia norda najbaro, kio estis amplekse informita dum tiu ĉi semajno dum la lastaj dudek jarojn laboradis por iom post iom redukti sian dependon de petrolo kaj krudaĵoj.

Diversaj energifontoj estis kaj daŭre estas evoluigataj en la insulo, nome, uzo de sun-kaj venta energio, danke al la kreado de enormaj fotovoltaj kaj eolaj parkoj; ankaŭ estas konstruataj mini hidroelektoj kaj oni profitas el biomaso.

Ĉi-kaze oni anoncis la konstruadon de la plej granda bioelekto de la tuta lando, kun kapacito por generi 62 megavatojn. Ĝin oni konstruas en la sukerfabriko Ciro Rendonde en la centra provinco Ciego de Ávila.

Biomaso signifas biologia maso, kvanto de viva materio produktita sur la tersurfaco a? pro specifaj organismoj. La termino estas ofte uzata en debatoj rilataj al la energio de biomasa, tio estas, energia brula?o kiu fontas rekte a? nerekte el biologiaj rimedoj. ?i devenas el ligno, agrikulturaj reziduoj kaj sterko.

En Kubo, la nun konstruata bioelektrejo funkcios pere de sukerkana reziduo, rekremento, kiu restas post la uzo de la sukerkano kies suko estas uzata por produkti la sukero. Tiu reziduo rolas kiel brula?o. Kiam fini?as la sukerkana rikolto, oni povas uzi kiel brula?on alian planton, kies nomo estas marabuo (en Kubo ?i estas speco el mimoza origina el Afriko, kiu rapide kreskas kaj formas nepenetreblajn arbarojn. ?ia ligno estas malmola kaj tre utila por fari karbon.

Per tiu kaj aliaj similaj projektoj, Kubo aspiras pliigi la uzon de renovigeblaj energifontoj en sia infrastrukturo de elektra generado ?is 24% ?is la jaro 2030, kaj la?eble iom pli.

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/comentarios/201947-kubo-diversigas-siajn-energifontojn>



Radio Habana Cuba